

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

N-o 52, 2. okt. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

## 25-jara Akademia Jubileo de Generalo Sebert.

La Franca Akademio de Sciencoj festos baldaŭ la arĝentan jubileon de nia eminenta samideano generalo Sebert, enirinta en ĝian mekanikan sektion en 1891. Tiun ĉi feston partoprenos ankaŭ la esperantistoj de la tuta mondo; ĉar la nomo de generalo Sebert estas intime kaj neforigebligita al tiu de nia lingvo.

Hyppolite Sebert naskiĝis en vilaĝo Verberie (departemento de Olse) la 30. jan. 1839. Post studoj en Kolegio de Compiègne kaj en liceoj de St. Omer kaj Douai, li eniris en la Politeknikan Lern-ejon en 1856, el kiu li eliris kiel oficiro de la mara artilerio.

Lia unua misio en Nova Kaledonio, liaj valoraj studoj kaj la organizado de arbara ekspluatado de ĉi tiu kolonio malkovris la scienculon, kiu estis en la juna oficiro. Reveninte Francujon iom antaŭ la milito de 1870/71, li estis post la milito unu el la sciencaj organizantoj de la franca artilerio. Li kreis kaj direktis la Centran Labor-ejon de la Maristaro, okupiĝis pri la senfulma pulvo, perfektigis torpedojn kaj inventis precizajn aparatojn por la determino de la balistikaj leĝoj, fariĝante unu el la plej kleraj balistikistoj de la mondo, kies nomo estas konata de ĉiulandaj artileristoj.

Eksiĝinte ankoraŭ juna en 1890, kun grado de generalo, Sebert dediĉis sin plene al industrio kaj scienco. La sekvantaj jaroj estas signataj per fruktoj de lia aŭtoritateco en la scienca mondo: en 1891 li estas ĉefsekretario de la Internacia Elektra Kongreso, en 1896 membro de la Scienca Akademio kaj sinsekve prezidanto de la Franca Societo por Fiziko, de la Internacia Societo por Elektro, de la Franca Societo por Fotografio kaj fine de la Franca Asocio de la Internacia Bibliografika Instituto de Bruxelles.

Esperantisto depost 1898, raportanto pri Esperanto al la Franca Akademio de Sciencoj en 1900, li — de tiu epoko — ŝparis nek tempon nek monon nek sian grandan aŭtoritatecon en la sciencaj medioj por la esperanta laboro. La agado kaj la grandaj meritoj de generalo Sebert kiel prezidanto de K. K. K. kaj de la Centra Oficejo estas tro konataj, por ke oni bezonu paroli pri ili. En la lastaj sukcesoj de nia lingvo liaj agado kaj aŭtoritato ludis rolon, kies grandecon multaj samideanoj ne supozas.

Malgraŭ siaj 83 jaroj, generalo Sebert daŭrigas sian fruktodonan laboron, donante ekzemplon de laboremo kaj energio, kiun multaj junuloj povus envii.

Ni ĉiuj do gratulu la eminentan akademianon kaj la malnovan pioniron de nia lingvo kaj prezentu al li niajn plej sincerajn bondezirojn.

### Internacio Katolika.

Pri la Internaciaj Katolikaj Konferencoj en Graz (10.—14. aŭg.), partoprenitaj de pli ol 150 reprezentantoj el 14 nacioj, ni ricevis antaŭ du semajnoj detalan raporton. Sed, pro la fakto, ke la raporto jam ne estis aktuala, kaj konsiderante la mankon de loko en nia jurnalo, ni represas ĉi-sube nur la rezolucion akceptitan en la ferma kunsido de la konferencoj. Ni volas menciigi ke 23 kardinaloj, ĉefepiskopoj, apostolaj nuncioj kaj aliaj ekleziaj eminentuloj el 12 ŝtatoj salutis entuziasme la agadon de Internacio Katolika kaj donis volonte sian benon kaj subtenon, antaŭ ĉiuj Lia Papa Moŝto mem.

La rezolucio tekstas:

La partoprenantoj de la internaciaj katolikaj konferencoj en Graz,

konvinkitaj, ke la hodiaŭa situacio de la katolikaro tutmonda pli ol iam bezonas internacian kunlaboradon de ĉiuj fortoj katolikaj kontraŭ la internaciaj unuigitaj fortoj de la nekrista homarismo, framasonio, materialismo socialista, nekredema eĉ kontraŭkristana scienco, literaturo, gazeto, politiko ktp., por la realigo de la regno de l' Dia Savinto en la mondo,

konvinkitaj, ke ĉi tiu kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj estas ne alia ol la natura sekvo de la ordo de la Dia Majstro de kristana karito kaj misiomandato,

konvinkitaj, ke ĉi tiu kunlaborado postulas la kreon de vere efika agadema helporganizo katolika internacia,

konvinkitaj fine, ke la organizata kunlaborado de la katolikaro tutmonda sur ĉiuj agadkampoj de la kulturo nur sukcesos, estante en plena konsento kun la sankta eklezio kaj en perfekta obeemeco al ties aŭtoritato, precipe la anstataŭanto de Kristo,

1. promesas absolutan fidelecon al la sankta eklezio kaj obeemon al la apostola seĝo, kies

sanktajn interesojn multfoje proklamitajn ili volas realigi per ĉiuj fortoj;

2. salutas tutekore la ĝisnunajn klopodojn de Internacio Katolika (Ika) por la realigo de vere agadema internacia helporganizo katolika, laŭdante ke Ika ĝis nun en nacie politikaj aferoj restis tute sendependa, nur rekonante kaj aplikante la principojn de vere katolika politiko;

3. deziras la daŭrigon de la klopodoj de Ika

a) por la edukado al vere kristana kaj katolika spirito de komuneco familia de l' katolikaro;

b) por la laŭplana internacia organizigo de la katolikaj fortoj tutmondaj bazanta sur la kreitaj aŭ kreotaj naciaj organizoj katolikaj kaj realigata laŭ la bezonoj de la moderna tempo, subtenante la nacian unuigon de la katolikaj fortoj diverslandaj, preparante laŭbezone la starigon de internaciaj fakaj aŭ profesiaj organizoj, ekzemple de laborunuiĝo de katolikaj parlamentistoj, laboristoj, komercistoj ktp.;

c) por la kreo de efikaj institucioj katolikaj internaciaj, precipe de internacia oficejo katolika peranta la internacian interkomprenigon, organizanta internacian informoservon ktp.; de internacia katolika libro-eldonejo por disvastigo de la ĉefaj verkoj katolikaj ĉiulandaj, de internacia gazeto katolika por la tutmondaj interesoj katolikaj;

d) por la starigo de internacia katolika helpa kaj informa servo pere de delegitoj destinitaj en ĉiuj urboj;

4. invitas fratmaniere ĉiujn individuajn katolikojn kaj ĉiujn katolikajn organizojn kaj ĉiujn samtendencajn movadojn kunlabore fervore kun Ika, evitante ĉian jaluzon aŭ egoismon ĉu politikan ĉu personan, por realigi per komunaj fortoj la kiel eble plej efikan helporganizon internacian por la apogo de la sankta eklezio kaj ties laboro por la perfekta realigo de la regno de Kristo en la mondo.

### Rememorante la XIII-an kongreson.

La radikoj de la sukceso de l' XIII-a esperantista kongreso troviĝas laŭ mia opinio en tio, ke ĝi estis multnombro vizitata, kaj ke preskaŭ ĉiuj partoprenantoj scipovis la esperantan lingvon,

### La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.  
Tradukta laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro  
Maria Ŝidlovskaja.

(54-a daŭrigo.)

Kelkaj viroj, virinoj kaj knabinoj, strange vestitaj, nudbrakaj, nudkruraj, ekaperis el malgrandaj lignaj budoj de la bordo kaj, interplektinte la manojn, ridante sin jeta en la ondojn, displaudigante la akvon, kiu aspektis peza kiel fandita metalo.

Ankoraŭ pli forte ekbalanciĝis la ŝanceliĝaj ondodorsoj, ankoraŭ pli rapide eksaltadis la fajroj en la akvo, sin intermiksante kun la koloraj rebrilaĵoj de l' ĉielo kaj de la luno; la ŝipetoj, nigraj, kvazaŭ faritaj el karbo, ekmoviĝis kaj eksaltetis sur la ondoj...

Ĉiam ankoraŭ ŝajnis al Mateo, ke li dormas kaj sonĝas. Fremda ĉielo, nekonata beleco de l' fremda naturo, fremda nekomprenebla gajeco, fremda sunsubiro, fremda maro... ĉio ĉi malfortigis lian lacan animon...

„Sinjoro Jesuo Kristo, sankta Virgulino! Ĉiu animo... Dio, kompatu min pekan...”

Iom post iom la balbutado de la stranga viro silentiĝis.

Li efektive nun dormis, kuŝante surdorse ĉe la bordo.

XX.

Li vekigis subite, kvazaŭ puŝite de lu, salte levigis kaj, ne havante konscion pri direkto aŭ celo, ekiris laŭlonge de la vojo. La maro tute mallumiĝis, la bordo estis senhoma same kiel la vojo. Dormis la vilaĝoj en la lumo de la alte staranta luno, dormis ankaŭ la altaj nekonataj arboj kun peza densa foliaro, dormis la ankoraŭ ne

finplugita kvadrata kampo, barita per ferfadeno, dormis la rekta ŝoseo, blanka kaj brilanta sub la lunradioj.

Eksonis sonorileto. Vagono elsaltis el la ombro de l' arboj kaj preterkuris tremante, tintante kaj basfajfante kiel nokta skarabo. Mateo postsekvis ĝin per la okuloj. Neniuj ĉevaloj, nek kamentubo, nek fumo aŭ vapore! Nur supre, en oblikva direkto, kvazaŭ palpilo de tiu ĉi stranga bestego el vitro, fero kaj ligno, elstaris maldika fera stango kun plidikigita ekstremo. Ĝi kvazaŭ kaptadis tie supre la metafadenon, apenaŭ videblan en la malluma aero, kaj ĉiufoje, kiam ĝi renkontis nodon, hela blueta fajrero brilis sur ĝia pinto...

La vagono malpligrandiĝis en la perspektivo, ĝia basfajfado malfortiĝis, la fajreroj estingiĝis, kaj el la ombro alkuris jam nova vagono, tiel same fajfante kaj tintante.

Verŝajne ĝi estis jam la lasta kaj preskaŭ senhoma. Dorrĉema konduktoro, vidante la izolitan figuron ĉe la rando de l' vojo, sonorigis, la vagono ekstremis, ekgrincis sur la revoj kaj malrapidigis la iradon. La konduktoro kliniĝis, subtenis Mateon je la kubuto kaj montris al li benkon. Mateo elpoŝigis moneron; eksonis la metala tintsono de l' mehanika kalkulilo, kaj la vagono jam ree ruliĝis, kaj kuris malantaŭen laŭ vilaoj, ĝardenoj, stratetoj kaj stratoj.

Komence ĉio ĉi estis dormanta aŭ endormiĝanta. Poste ĝi kvazaŭ komencis vekigi, ekbruis, ekparolis, eklumis. Fajrorebriloj aperis en la ĉielo; vicoj da fenestroj pli kaj pli altaj grimpis al la ĉielo.

„Ponto!” diris la konduktoro. Mateo elvagiĝis, bedaŭrante, ke ne estas eble tiel same veturi eterne. Ree troviĝis antaŭ li la fajro de l' pontego de Brooklyn. Supre spirblova lokomotivo ree faris rondturnon kaj alkroĉiĝis al vagonaro. De

maldekstre ruliĝis vagonoj, de dekstre elkuris aliaj, tute apude preterondris ŝarĝveturiloj, paŝis maloftaj piedrantoj.

Meze de la pontego Mateo haltis. Liaj oreloj zumis, lia kapo turniĝis! Preterkuris vagonaroj, vagonoj, kaleŝoj, la ponto obtuze bruidis, kaj terure estis aŭdi la akran fajfadon de vaporŝipoj, venantan de malsupre, el la malproksima profunda senfundaĵo, plena je moviĝantaj fajretoj...

En la ĉielon leviĝis grandegaj palisoj, de kiuj malsuprenpendis ŝnuregoj de eksterordinara dikeco. Reto de dikaj feraj trunkoj, kiuj de sur la ŝipo aspektis kiel delikata araneajo, pendis sur ŝnuregoj, subtenante la pontegon. Tra tiu reto oni apenaŭ povis vidi la riveregon, kiu kunfluis kun la golfo kiel unu sola brila maro, en kiu dronas kaj el kiu ree aperas fajroj de vaporŝipoj. Kaj ree miltaj da fajroj, kiel steloj, pendis super la akvo kaj perdiĝis en la perspektivo, kie novaj fajroj de New-Jersey<sup>28</sup> aliĝis.

Meze de tiu maro da fajroj, en la malproksimeco, la okuloj de Mateo apenaŭ distingiĝis la rondan fajran diademonon kaj la torĉon de la Libereco... Ŝajnis al li, ke en la blueta lumajo li vidas eĉ la kapon de la kupra virino kaj la levitan manon. Sed la lumo, kiun eligis la figuro, estis malforta, apenaŭ briletanta, ĝi similis al liaj ĵus travivitaj tagoj kaj revoj pri feliĉo en fremdlando...

En la nigra profundaĵo de l' pontego lumetis malgranda fenestro en la dometo de l' ponto-gardisto, kaj la gardisto mem kiel lumvermo el-rampis el sia kaŝturo kun lanterno en la mano. Li tuj ekvidis sur la ponto allandulon, kio ĉiam tre plaĉas al amerikano.

„Ĉu mi ne povas ĉe vi pasigi la nokton?” demandis Mateo per voĉo laca.

<sup>28</sup> Elp.: Nju-Jersey.

Antaŭe mi estis ankoraŭ neniam en esp. kongreso; tial mi pensis antaŭ la kongreso, ke nur la duono de la partoprenantoj povos flue paroli Esperanton, dume ĉiuj aliaj nur komprenos aŭ scipovos kelkajn esperantajn frazojn. Sed kia estis mia miro, kiam mi konstatis tute alian aferon, pro kiu mi estas devigata esprimi mian grandan ĝojon.

Pri la XIII-a kongreso mi tamen volas fari kelkajn rimarkigojn. Generale parolante, inter la esperantistoj estas multaj idealistoj. Kaj multaj el tiuj idealistoj ifoje tiom entuziasmiĝas je siaj revoj, ke ili komencas eĉ kredi baldaŭn efektivigon de la eterna paco en la mondo. Kvankam mi mem tre deziras ĝisatendi tiun eternan pacon, tamen mi tute ne kredas, ke tutmonda paco povus efektivigi ĝis la fino de l' XXI-a jarcento. Eĉ Esperanto, kiam ĝi estos akceptita de ĉiuj, ne povos tuj forigi la militojn. Tamen internacia lingvo plifaciligos la reciprokajn interkomprenigadon de l' homoj kaj servos al tiuj personoj aŭ agantoj, kiuj penas meti la fundamenton por la starigo de la paco, kiu efektivigos eble post kelkaj jarcentoj aŭ jarmiloj.

La XIII-a diferencigas de la aliaj aŭ antaŭaj kongresoj per pli malgranda nombro da naŭvuloj kaj fantazuloj; tio estas granda progreso. La kongreso de Praha havis tiel nomatajn fakojn, en kiuj estis pritraktataj la aferoj de nuntempa reala vivo.

Se oni povus ion riproĉi pro tiuj ĉi fakoj, tio estus nur tiu fakto, ke la aferoj dum la fakaj kunvenoj ne estis pli serioze aŭ pli profunde pritraktataj kaj esplorataj. Tamen tio, kio okazis en tiuj kunvenoj, jam malfermas por niaj rigardoj en la estontecon bonan perspektivon. La fakaj kunvenoj parte jam pruvis la necescon de la internacia lingvo al tiuj skeptikuloj, kiuj ĝis nun ĉiam opiniis, ke Esperanto ne taŭgas por diversaj sciencaj, ekonomiaj kaj politikaj traktadoj.

Per la XIII-a kongreso mi konvinkigis, ke oni devas uzi Esperanton por la praktika vivo. Se ni deziras, ke sociaj, registaraj, sciencaj kaj aliaj rondoj ekinteresiĝu pri la enkonduko de Esperanto, ni devas uzi nian agadon kaj nian lingvon por ĉiuj aferoj de la reala vivo. Komprenoble, diversaj amuzoj, teatraĵoj, ekskursoj, kiuj okupas sufiĉe grandan lokon en esperantistaj universalaj kongresoj, estas dezirindaj kaj bonaj aliaj, sed sole tiuj amuzoj aŭ gajlaj aferoj ne povas tute kontentigi nin; ĉar oni devas akomodati la internacian lingvon al ĉiuj sferoj de l' kultura, ekonomia kaj politika vivo. Kaj al mi ŝajnas, ke kunvokante la XIV-an al Helsinko, oni devus emeti en la tagordon de la kongreso tiajn demandojn, kiuj povus aliri la atenton de multaj registaroj kaj grandaj sociaj organizaĵoj, ĉar nur tiam oni povos esperi, ke tiuj registaroj aŭ organizaĵoj alsendos al la kongreso siajn oficialajn delegitojn. Ju pli multe da diversaj oficialaj kaj aliaj delegitoj partoprenos, des pli bone estos por la ĝenerala sukceso de Esperanto, kaj oni ricevos pli grandan impreson de esperantista kongreso.

K a u n a s (Litovio)  
Kelstuĉo 14.

A. Klimas.

## Skota Esp. Kongreso

24.—25. sept. en Dunfermline.

La dufoje prokrastita Skota Kongreso okazis la 24-an kaj 25-an de septembro en Dunfermline (bone konata urbo el la skota historio; naskiĝurbo de la milionulo Andrew Carnegie). Ĉeestis la kongreson ĉ. 180 esperantistoj. Regis plej granda entuziasmo.

La urbestro prezidis la propagandan kunvenon sabaton vespere, kaj en longa parolado fervore subtenis la esp. movadon. La ĉefparolantoj estis s-ino Watson, ano de la Edukada Aŭtoritato, kaj s-o Page el Edinburgo. S-o Page rakontis siajn spertojn okaze de la kongreso de Praha, kaj s-ino Watson promesis daŭrigi fari sian eblon por la enkonduko de Esperanto en la taglernejoj. La du parolantoj estis laŭte aplaudataj.

En la daŭro de la vespero okazis kantoj kaj deklamoj en Esperanto, kiuj multe impresis la grandan ĉeestantaron.

Dimanĉon matene oni tramveturis al Rosyth. Posttagmeze pastro Baird el Dunfermline kaj s-o Page faris diservon en la abatejo de Dunfermline.

Entute la intereso de la publiko estis vigla, kaj la kongreso de Dunfermline certe bonefikos je nia movado en Skotlando.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Ankoraŭ pri la Kooperativa Kongreso en Basel.

Eltrankaĵo el la franca gazeto „L'avenir régional“, n-o 67 de 27. 8. 21, organo de la „Société fédérale de fusion, Lyon“, rilate al la Kongreso de la Internacia Unuiĝo Kooperativa (The Co-operative Union Ltd., L'Alliance coopérative internationale) en Basel (Svisl.): . . . Oni devas ankaŭ noti la fakton, ke ĉi tiu granda kongreso estis grava kaj frapanta demonstraĵo pri la necesco akcepti sciencan internacian lingvon por la kooperativa unuiĝo, kiu volas esti tutmonda. La devigo de tiu traduko de ĉiuj sur la podio faritaj paroladoj en pluraj lingvoj igas la debaton senfine longdaŭra trozanta tiamaniere supermezure la pasivan paciencon de la kongresistoj. Kaj kiom da kongresistoj, kiujn alproksimigis intuitiva simpatio, kiuj premas la manojn kaj ofte alridetas unu la alian, ne povante interŝanĝi kompreneblajn vortojn? Se Esperanto,

kiel al mi ŝajnas, estas la plej bona el la nuntempe ekzistantaj artefaritaj lingvoj, estas necese, ke la Internacia Unuiĝo Kooperativa rapide decidu, ke ĝi (Esperanto) estu baldaŭ, ekz. dum la venonta kongreso en Gand (Belg.) 1924, la oficiala lingvo.

— En speciala kunsido de 19. aŭg. estas akceptita jena rezolucio: La Kongreso de la Studentoj de la Unua Internacia Somerlernejo esprimas ĉiufoje sian konvinkitecon, ke komuna internacia lingvo estas esenca (grava) por la estigo de interrilatoj inter la popoloj de ĉiuj nacioj kaj dezirinda rilate al paco, bonvolo kaj progreso.

### La Orient-Nederlanda Esp. Kongreso

okazinta la 18-an de septembro en Deventer sukcesis bone. Ĉiuj grupoj en la provincoj Overijsel kaj Gelderland estis reprezentataj. Paroladis s-o Meyer el Heerewaarde pri la 13-a Kongreso, s-o Ad. Smit pri la propagando en Orient-Nederlando. S-o G. P. de Bruin laŭtleĝis tradukaĵon el verko de Multatuli, kaj f-ino Colenbrander ĝuantigis la ĉeestantojn per kelkaj belaj kantoj. Post kelka diskutado oni decidis laŭ propono de s-o Smit fondi propagandan komitaton por Orient-Nederlando. Ĝi konsistas el s-oj Smit, ten Have, de Lange kaj Gerards. Certe la ĉeestantoj kunprenis hejmen bonan kaj agrablan impreson kaj novan fervoron por nia afero.

Prof. Yzerdraat.

S-ano J. G. el Rotterdam informas nin jene: Leginte vian raporton pri l-a Kongreso de Idistoj, en kiu ankaŭ estas nomata la nomo de s-o Yzerdraat el mia urbo, mi volas atentigi vin je la fakto, ke tiu sinjoro ne rajtas la titolon de profesoro, kiun vi donas al li, ĉar profesoro en Nederlando nur estas universitata docento, kaj la nomata s-o estas instruisto (Leeraar = Lehrer) en „slöjd kaj skribado“ je lernejo por instruistoj en Rotterdam. Kiamaniere li sukcesis en la nomigo de oficiala reprezentanto de nederlanda ministro, mi ankaŭ ne komprenas.

### Esperanto inter ukrainaj elmigrantoj.

S-o Salo Grenkamp sciigas nin, ke inter ukrainaj elmigrantoj en Tarnow (Pol.) li renkontis multajn esperantistojn. Troviĝas tie, interalie, s-ano Ĉerniavskij el Kamieniec Podolski, ukraina poeto Smolenko, ing. Horbaĉevskij, Svjatohorov ktp. La redakcio de esp. gazetoj estas petataj sendi kelkajn ekzemplerojn senpage al Ukraina Oficejo en Tarnow, Pollando, Hotelo Bristol, por Esperantistoj.

### Pri la Foiro de Frankfurt.

En la lastaj du monatoj antaŭ la foiro la foir-oficejo ekspedis ĉiutage 20000 presajojn! Entute estas forsendataj en unu jaro ĉ. 2 1/2 milionoj da presajoj en dek lingvoj, ankaŭ Esperanto.

La foiroj de Frankfurt okazos en 1922 de 2-a ĝis 8-a de aprilo kaj de 24-a ĝis 30-a de septembro.

### Ĝejunulara Esp. Ligo en Bulgario.

Je 17. kaj 18. aŭg. okazis la starigo de Ĝejunulara Esp. Ligo en Bulgario. Oni ellaboris regularon kaj fondis la Ligon celantan la propagadon de Esperanto inter junuloj kaj organizon de la junularo. La Ligo funkcias kiel branĉo de Centra Bulg. Esp. Ligo. La Ligo volas esti en rilatoj kun ĉiu junula esp. organizaĵo. Adreso: Ĝejunulara Esp. Ligo en Bulgario, Panagjuriŝte. (Sokr.: Jan Stajkov, gvidanto: D. Panĉev.)

### Propaganda Tago en Koblenz (Germ.).

La propaganda tago bone sukcesis. Post bona antaŭpreparado (gazetarikoloj, anoncoj, afiŝoj ktp.) la festo komenciĝis la 4. sept. matene per granda esp. ekspozicio. Propaganda kunveno kun konvinka parolado de s-o Stroh. Posttagmeze koncerto, teatraĵoj, kantoj ktp. Vespere balo. Krom multnombra publiko multaj aliurbaj ĝesamideanoj vizitis la feston, inter ili la prezidantoj de Revelo, s-oj Junker kaj Hurler el Köln. Unua kurso komenciĝis la 25. sept. (gvid. Stroh), dua la 27. sept. (gvid. Funken). Rebiciklante el Prago, du antwerpenaj instruistoj restadis kelkajn tagojn en Koblenz ĉe familio Lorenz. La oficejo de la esp. grupo estas: Löhrrstr. 90.

### Ĉu la spesmilo revenos?

En granda parolado en Dundee, en kiu li pritraktis la iran demandon, la malprogreson de la mondkomerco, la bolŝevisman kaj la konferencon de Washington, Mr. Churchill interalie diris, ke estus por la profito de la tuta mondo, se ĉiuj internaciaj ŝuldoj, devenintaj el la milito, estus malpliigataj je praktike plenumbla alteco; ke senpere necesa estas la internacia monsinistemo, kiu estus nelinuatita de la militŝuldoj, almenaŭ kelktempe kaj dum la periodo de saniĝo, kaj kiu certigus la vendadon de komercaĵoj inter la nacioj sur natura, normala bazo. Plue li diris, ke pli grava kaj pli urĝa ol la venonta konferenco en Washington pri la malarmado estus konferenco pri la kreado de normalaj valutoj. Jen revenonta la spesmilo!

## XI-a Germana Esp. Kongreso en Breslaŭ.

(3.—6. junio 1922.)

### Tria Komunikilo.

1. La kongreskomitato petas insiste, baldaŭ anonci la fakunsidojn okazantajn dum la kongreso kaj eble la eventualan nombron de la partoprenantoj de ĉi tiuj kunsidoj.

2. Kongresa lingvo estos la germana. Permesata estos ankaŭ Esperanto por lertigi sin en nia kara lingvo kaj prepari sin por la venonta mondkongreso.

3. Kongresejo: Vincenc-domo, oportune lokita ĉe la promenejo proksime de la ĉefstacidomo.

4. Aliĝiloj estas preparataj.

Oni petas, baldaŭ aliĝi. Kotizo ĝis 1. aprilo 1922: 20 mk. (por samfamilianoj 15 mk.), poste po 10 mk. pli, estas sendata al s-o Habellok, poŝtĉekkonto Breslaŭ I, 13987.

Bonvolu helpi pligrandigi la garantian fondon!

Hanuschke, kongressekr.,  
Breslau IX, Hedwigstr. 11.

## Io-ujo.

En la lasta n-o de „Esperanta Finnlando“ la redakcio skribas, ke — por forigi ĉiujn kaŭzojn de malpaco — ĝi decidis uzi -io estonte nur ĉe landnomoj finiĝantaj „internacie“ per -i-. En aliaj kazoj ĝi uzos -lando.

Sekvante tiun ekzemplon, ni esperas unuflanke kontentigi la konservativemulojn, kaj aliflanke ricevi tiom pli grandan liberecon por funde esplori kaj pridiskuti la demandon, ĉar laŭ nia plena konvinko la regula sistema aplikado de -io ĉe ĉiuj nomoj de landoj, grandaj provincoj kaj insuloj, eble eĉ kontinentoj, estus la plej esperanteca solvo de la demando kaj neniel kontraŭfundamenta.

Redakcio de ET.

## Kelkaj pensoj pri la foiroj.

Kiel sekretario de eksporta akcia societo, mi skribis en Esperanto al ĉiuj foiroj uzantaj Esperanton, petante sendi al mi dokumentojn en franca kaj esperanta lingvoj.

Jen estas la rezultoj:

1. Kelkaj foiroj respondis tre akurate: unu transalpa per ekspres-letero, unu el la ĉefurbo de iam diversnacia imperio per rekomendita letero.
2. Du transrejnaj ne respondis.
3. Unu el la kongreslando de la nuna jaro sendis nur franclingvajn dokumentojn.
4. Unu el la ĉefurbo de la nunjara kongreslando respondis unue per bona esperanta letero, sed post du semajnoj alia oficisto respondis france kun dektri gramatikaj eraroj.
5. Unu el la ĉefurbo de iam diversnacia imperio respondis en jena Esperanto:

5 September 1921.

trnloroj,

Respondante vian karton de la 25 de Aŭgusto mi kune kun tin-ĉi letero sendas ac vi la deziratajn prospektojn de la Vienas-foiro (an Esperant kaj trana lingvo) Raj vestas kun altestimo

2 francaj  
2 Esperanto Prospektetoj.

Miaj konkludoj el tiu ĉi sperto estas la jenaj:

1. La foiroj devas tre akurate respondi al ĉiuj demandoj.
2. Nerespondo estas nekomprenbla kaj ofte ĉesigas komercajn rilatojn.
3. La foiroj devas precize plenumi la petojn de la demandantoj.
4. Se ili respondas al letero el alilingva lando en ties lingvo, la oficistoj devas bone posedi ĝin.
5. Ne sufiĉas eldoni esperantajn prospektojn. Estas necese havi bone parolantan kaj skribantan oficiston.

Leon Agourine,

19, rue Pierre Nicole, Paris 5.

PS. Kelkaj francaj samideanoj, intencante interesigi pri nia lingvo gravajn komercajn instituciojn, petas ĉiujn foirojn, firmojn kaj konercajn revuojn kun esperanta fakto, sendi siajn eldonaĵojn al mia adreso.

## Grava sveda eltrovaĵo.

Jam dum la pasinta vintro oni eksciis, ke sveda inĝeniero faris tre gravan eltrovaĵon, kaj nun la gazetoj komunikis, ke la eltrovaĵo estas perfektigita kaj preta por uzado.

La sveda inĝeniero Berglund dum multaj jaroj laboris por konstrui parolantan filmon. Oni jam aŭdis pri tia filmo, sed neniam vidis ĝin; tio dependis de ĝia neperfekteco. La sistemo de ing. Berglund estas tute nova. La bildoj kaj la parolado okazas tute samtempe, kio estas nepra kondiĉo. La diferenco inter la apero de la bildo kaj la tono apartenanta al ĝi estas eĉ ne centono de sekundo.

La antaŭaj eltrovintoj de parolanta filmo uzis kune kun la ordinara filmo gramofon-aparaton, sed en la sistemo de ing. Berglund la bildoj kaj la sonoj estas fiksitaj sur la sama slipo.

Alian preferindecon prezentas la bona elparolo de la filmo. La elparolo de la gramofonoj havas ja grandajn mankojn, oni povas diri, ke ili „paroladaĉas“. La elparolo de la parolanta filmo estas tute alia, eĉ la plej delikatajn sonojn oni povas aŭdi sufiĉe bone. Oni faris provojn kaj ricevis bonegajn rezultatojn. La sveda profesoro Montelius, kiu posedas plensonan voĉon, faris paroladon, kiu estis redonata per la parolanta filmo, ankaŭ la franca eksministro Albert Thomas faris en Stockholm franclingvan paroladon antaŭ la filmigilo; sur la blanka tuko oni poste vidis lian vigan staturon, la mienojn en lia vizaĝo, kaj eĉ la svedaj aŭskultantoj povis percepti ĉiujn nuancojn en lia parolado.



Dum la venonta vintro oni jam vidigos en biografoj (kinematografoj) parolantan filmon. Akcia societaro (A/B. Filmfotofon) estas fondita por la ekspluato.

La eltrovaĵo havas por la esperantistoj specialan intereson. Ĝis nun oni povis la saman filmon uzi por vidigo en ĉiuj landoj, nur la klarigajn notojn oni bezonis traduki. Sed je la uzo de parolanta filmo estos necese fari tute novan filmon en la lingvo de la koncernata lando. Esperanta filmo tamen povus esti uzota en la tuta mondo, jen granda triumfo nia.

Henning Halldor.

## Tutmonda Monkolekto por Monumento al D-ro L. L. Zamenhof.

Alvoko al Samideanoj, kiuj promesis Mondonacojn, kaj aliaj.

La XIII-a kongreso en Praha unuanime aprobis la rezolucion proponitan de la Internacia Komitato, kaj decidis, ke estas necese starigi la monumenton, laŭ la plano difinita, al d-ro Zamenhof.

La projekto do (vidu antaŭan artikolon) nun eliras el la embria stato kaj eniras en la praktikan vivon de la esperantista movado, kies tutkora subteno ĝi nepre devas ricevi. Individuaj esperantistoj same kiel kolektivaj grupoj estas petataj veni kun sia helpo. La kuponkartoj estos eldonataj post iom da tempo, sed dumtempe la Organiza Komitato petas:

1. Samideanoj, kiuj jam promesis mondonacojn, sendu la promesitajn sumojn rekte al la Honora Kasisto, W. M. Page, 31 Queen street, Edinburgh, Skotlando.
2. Samideanoj, kiuj ne faris promesojn, sendu mondonacojn tuj al la Hon. Kas. (bankbiletoj el ĉiuj nacioj estos akceptataj).
3. Grup-sekretarioj estas petataj aranĝi por tiu celo dum la vintra sezono sistemajn monkolektojn.

Nebritaj samideanoj, kiuj tion deziras, povas sendi siajn mondonacojn al la prezidantoj de siaj naciaj societoj, de kiuj la Organiza Komitato ricevos de tempo al tempo la necesajn avizojn pri la sumoj ricevita kaj sendos instrukciojn pri la disparto de la mono tiele kolektita.

Por la Organiza Komitato:

J. D. Applebaum, Hon. Sekretario,  
11 Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.  
Aliaj jurnaloj estas petataj represl.

## Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represigi en naciaj jurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1-2 ekzemplerojn de la koncerna jurnalo al la redakcio de ET.)

### LETERO EL BRAZILUJO.

Fortaleza (Ceara), sept. 1921.

Sendube la plej grava kaj rimarkinda fakto, kiu aktuale interesas ne nur Brazilujon, sed ankaŭ multajn aliajn landojn, estas „La Granda Nacia Ekspozicio“, kiu efektiviĝos okaze de la unua centjara datreveno de la sendependiĝo de Brazilujo la 7-an de septembro 1922.

Cent jaroj de sendependa kaj progresema vivo de lando estas kaŭzo de multa ĝojo kaj festo; kaj ni, braziloj, antaŭsentas tiun ĝojon kaj penadas prezenti Brazilujon antaŭ la okuloj de ĉiuj popoloj, kiel fakte ĝi estas: granda kaj riĉega lando, kiu produktas ĉiujn specojn de nutraĵoj; lando, kies subtero entenas ĉiujn mineralojn, ĉefe oron kaj kupron; lando, kies natura beleco, ravaj akvofaloj, ĉarmaj virinoj kaj liberemaj viroj estas elokventa antaŭvido pri ĝia bela estonteco.

Pro tio, de nordo suden, de oriento okcidenten, la entuziasmo por la plej bona sukceso de la festo naskiĝas ĉe ĉiuj braziloj kaj la preparoj tuj elmontriĝas.

La plej profitdona el la festaj entreprenoj estas „La Granda Nacia Ekspozicio“, kies efektiviĝo estas ordonita de Brazila Kongreso.

La registaro, por akiri kaj prepari la sidejon de l' Ekspozicio, jam proprigis al si multajn loĝejoj kaj elspezis ĉirkaŭ kvar mil milionojn da rejsoj... (4 000 000 000).

El la eksterlando jam 15 landoj sin turnis al la registaro petante lokojn por partopreni en la Ekspozicio. Belgujo, Anglujo kaj Germanujo deziras prezenti stajn ĉefajn industriaĵojn, kaj por tion efektiviĝi, ili penadas akiri grandspacajn lokojn.

Konklude de la regantaj entuziasmo kaj intereso, estas espereble, ke la Ekspozicio alturnos al Brazilujo la atenton de la komercistoj de l' tuta mondo; ĉar tie ili povos profiti de la okazo efektiviĝi komercajn interrilatojn kaj samtempe partopreni en la centjara datrevena festo kaj miri pri la natura beleco kaj rimarkinda progreso de Brazilujo.

Speciala rolo estos ludata de Esperanto antaŭ kaj dum la Ekspozicio, ĉar la tuta mondo interesiĝas pri ĝi, tiamaniere estas facile konkludeble, ke eksterlandaj interesatoj, kiuj ne scias la portugalan lingvon kaj kiuj scias, ke la ĝenerala sekretario de la Ekspozicio estas nia fervora kaj nelacema samideano d-ro J. B. de Mello e Souza, skribu al li, petante informojn per Esperanto.

Al la tutmonda esperantistaro estos donata profitinda okazo pruvi la necescon de komuna lingvo.

Ekzemple, se la ĝenerala sekretario ricevos de ĉiulandaj interesatoj multajn informojn pri komerco, industrio, artoj, kutimoj ktp., certe la registaro konvinkiĝos pri la utileco de Esperanto, kaj sekve li uzu ĝin oficiale ne nur por propagandi la Ekspozicion, sed ankaŭ por plifaciligi la rilatojn inter la fremduloj, kiuj partoprenos en la festo kaj kiuj nepre estos multnombraj.

S-o J. B. de Mello e Souza sendos al tiuj, kiuj lin petos, fotografiaĵojn, prospektojn, statistikajn informojn kaj ĝeneralajn sciigojn, kiel propagandon de la ekspoziciotaj brazilaj produktaĵoj.

Francisco Falcao.

## Juro.

### Juristaj studentoj de ĉiuj landoj!

La edukado de la jurista studento en la diversaj landoj estas malsama. En tiu ĉi lando li devas plenumi du ekzamenojn universitatajn, en tiu lando kvar, en alia lando oni ne konas la tiel nomitan „promotio“, en ree alia lando la „promotio“ estas la „conditio sine qua non“, kiu donas la „effectus civilis“. Fine la ekzamenoj havas diferencon en havon.

Por pristudi la edukadon de la jurista studento mi petas al miaj eksterlandaj kolegoj, ke ili serioze bonvolu (kaj se eble detale) respondi jenajn demandojn:

1. Ĉu estas la universitata edukado de la jurista studento en via lando?
2. Kio estas la enhavo de la ekzamenoj kaj kiom da ekzamenoj li devas plenumi kaj post kiom da tempo?
3. Ĉu li krom siaj lecionoj ankaŭ havas devigan praktikan laboron antaŭ ol fariĝi „doctor juris“?
4. Ĉu la „doctor juris“ samtempe estas advokato aŭ ĉu li devas kelke da tempo fari praktikan laboron kaj ricevas post tiu ĉi laboro la advokatan diplomon?

Bv. direkti respondojn al J. Munters, 29 bis, Belamystraat, Utrecht, Hollando.

## Gazetaro.

### Esperanto en francaj gazetoj.

Pri la diskuto je Esperanto en la Ligo de Nacioj parolis favore aŭ senpartie jenaj parizaj jurnaloj: L'Intransigeant de 15. sept., Le Temps de 15. kaj 16., Figaro de 15., La Victoire de 15., L'Ere nouvelle de 16.

Malfavore parolis Le Cablogramme, Paris, de 15., Strasbourg Neue Zeitung, Strasburgo, de 14. sept.

„LE BULLETIN de l'Association des sous-Ingénieurs du service municipal“ de Paris publikigas en la lasta numero paroladon faritan de s-o Archdeacon en ĉi tiu societaro la 20. 12. 20.

L'INDEPENDANT REMOIS, ĉiutaga en Reims, de 15. sept., kun tre favora artikolo pri propaganda parolado de s-o H. Perez. Anonco pri fondo de esp. grupo.

HEBREA TRIBUNO, semajna gazeto de Paris en rusa, franca kaj angla lingvoj, de 18. 8. 21, kun noteto pri la internacia unuigo de hebreaj esperantistoj; citas ET.

BULLETIN DE L'ASSOCIATION POLYTECHNIQUE (grava kleriga asocio), sept., donas la nomojn de premitoj por la studo de Esperanto solene rekomencitaj la 17. junio en Trokadera Palaco en Paris dum jarfesto.

LE JOURNAL DU CREUSOT, ĉiutaga en Le Creusot, 4. sept., anoncas pri kunveno de la esp. grupo, havanta pli ol 400 membrojn kun honora prezidanteco de la urbestro.

PROGRES CIVIQUE, semajna en Paris, 23. sept., publikigas la decidon de la Ligo de Nacioj.

L'ECHO D'ORAN, ĉiutaga en Oran (Algerio), 16. sept., telegramo pri la sama decido.

### Esperanto en finnaj gazetoj.

El ĉ. 100 gazetoj nuntempe aperantaj en Finnlando 63 gazetoj enhavis en la lastaj du monatoj (julio-aŭgusto) entute 184 artikolojn pri Esperanto. Tre ĝoja sukceso!

SUOMEN KUVALEHTI, semajna revuo, enhavas en n-o 86 ilustr. artikolon pri la 15 a.

### Esperanto en germanaj gazetoj.

KÖLNISCHE ZEITUNG, Köln, 17. sept., unua matena eldono. Unu el la plej gravaj jurnaloj de Germanio, kiu rigardas la esp. movadon tre skeptike, enhavas bonegan artikolon de H. Hurler pri „Intereskomuneco de la Folroj“. La aŭtoro kritikis interalie la samtempecon de multaj folroj, kiu malutilas al ilia sukceso. Li mencias la konferencon de la esp. reprezentantoj de la folroj de Stockholm, Frankfurt, Wien, Padova, Basel, Paris, Lyon, Barcelona kaj Praha en Praha, kiu iniciatu la starigon de internacia ekonomia programo de la folroj.

STADT-ANZEIGER, Köln, 19. sept. Enhavas artikolon pri Esperanto en Ligo de Nacioj.

DÜSSELDORF. Okaze de la propaganda semajno en tuta Germanio, aranĝita de G. Lab. E. A., ĉiuj socialistaj gazetoj de Düsseldorf aperigis artikolojn pri la kongreso de Praha kaj ĝenerale pri Esperanto, ekz. Freie Presse, Die Schöpfung, Die Volkszeitung, Freiheit, Mitteilungsblatt des Gewerkschaftsbundes. — Düsseldorf Nachrichten raportis pri la decido de Ligo de Nacioj.

TREBNITZER ANZEIGER, 24. sept., publikigas de nun regule esp. angulojn laŭ la libreto de s-o Loy.

MÜHLSDORFER ANZEIGER, 21. sept., kun artikolo pri Esp. de Ligo de Nacioj, kun mencio de ET.

### Aliaj landoj.

NOTRE PAYS, belga ilustr. gazeto, kun foto pri la Praha kongreso.

LE MOSSAN, en Ardenne-Seille, Belg., kun kurso de Esperanto.

YSTADS ALLEHANDA. Granda tagjurnalo de Ystad, Sved. 7. sept. Kun traduko de Letero el Bulgario laŭ ET.

LA PATRIE LADINE. Sept. En friula lingvo, kun resumo en Esperanto.

ONS EIGEN BLAD. Grava dusemajna pedagogia revuo. Tilburg, Nederl., n-oj de 1. kaj 15. aŭg. kaj de 1. sept. Enhavas longajn artikolojn pri internacia lingvo, spec. Esperanto, kaj pri Esperanto en lernejoj.

GUIA PROFESSIONAL. Barcelona, Hisp., 30. aŭg. Dusemajna revuo, kun artikolo „Esperanto en Hispanujo“, de V. André.

LA LUCHA DE CLASES. Socialista semajna jurnalo de Bilbao, Hisp., 10. sept. Kun „Impreso de ĉesistinto al la Kongreso Internacia de Esperanto“.

GAZETTA DE L'POPOLO, Torino, Italio, 14. sept., noto pri la decido de Ligo de Nacioj.

AZ EST, A NAP kaj NEPSZAVA, Budapest, aperigis artikolojn pri la esp. postkongreso, menciante ET.

O ESCOTEIRO. Oficiala organo de la kat. skoloj de Brazilio. Rio de Janeiro, 15. aŭg. Kun artikolo pri Ligo de Esp. Skoloj.

### Atentigo.

Pro la ĉiam pligrandiganta multeco de sciigoj pri Esperanto en la diversnaciaj gazetoj ni estonte mencios nur la gazetojn, urbojn, landojn kaj datojn; sole pri gravaj artikoloj en gravaj jurnaloj ni recenzos pli detale.

## Filatelio.

HUNGARIO. La unua hungara poŝtmarko aperis en 1871. Por festi la 50-jaran jubileon, estis la 27. sept. en Budapest festkunsto en la Scienca Akademio kaj poŝtmarka ekspozicio kun aparta poŝtoficejo. (Hung. Esp. Servo.)

ESTONIO. La 6. sept. okazis en Tallinn tragardado de projektoj pri novaj estoniaj poŝtmarkoj. Dekses personoj partoprenis la konkurson, sed nur unu el ili ricevis premion por la figuraĵo de la 5-marka poŝtmarko. La figuraĵoj de la 2<sup>1</sup>/<sub>2</sub>-kaj 10-markaj pm. de l' sama aŭtoro, nome de T. Björnström en Helsinko, estis ankaŭ akceptataj, sed bezonas teknikan prilaboron kaj tial la komisiono decidis aĉeti ilin por la sumo de la dua premio, t. e. por 5000 est. mk. (H. J.)

## Neŭion — krom.

Neŭion mi povas oferi al Vi,  
Neŭion donaci el koro —  
Krom noktoj sendormaj, krom tiu pasl',  
Krom forta, senlima doloro.

Serenaj ekridoj de amo en kor'  
Neŭiam al Vi ekmateno,  
Ne suno brilanta, ne hela aŭror',  
Sed nokto senluna sin trenos.

Dum longa migrado en viva la bru'  
Fortunan mi perdis jam riĉon —  
La rozojn de ĝuo ne havas mi plu,  
Ne donas mi jam la felĉon.

Neŭion mi povas oferi al Vi,  
Neŭion donaci el koro —  
Krom noktoj sendormaj, krom tiu pasl',  
Krom forta, senlima doloro.

Stanislaw Braun.

Al mia amiko, vicdelegito de UEA en Varsovio  
**S-o Jozef Litauer**  
okaze de lia fianĉiĝo kun  
**F-ino Marja Zugajewicz**  
mi sendas plej korajn bondezirojn.  
**Adolfo Oberrotmann,**  
Delegito de UEA en Varsovio.

## Peresperanta propaganda parolado!

Per Esperanto tra 17 landoj.

Sep jaroj en Argentino.

Por orienti interesemulojn:  
ĉirkaŭ 120 lumbildoj pri jenaj temoj:

Vojaĝoj. — UEA-servoj. — Esperantujo. — Buenos Aires. — Argentinaj pejzaĝoj. — Popola vivo. — Kutimoj. — Specialaĵoj de terkultura kaj brutarkreskiga medio, de industrio, komerco, vivkondiĉoj kaj pliaj karakter- : : : : izaj interesaĵoj. : : : : Konferencperiodo: fino de oktobro kaj novembro.

Invitantoj partoprenos je la kostoj de ĉi tiu multekosta entrepreno per almenaŭ 500 germ. markoj el malaltvalutaj landoj, per duobla sumo el ceteraj landoj.

Por ĝustatempa organizado urĝas tuj sciigo al:

**L. Kelety, Szászsebes (Sebesul-Sasesc), Transsilvanio, Rumanujo.**

**De n-o 55 (23. okt.) ET aperos en pli granda formato kaj ilustrata.**

Grandkomercejo de Furnirligno.  
Lignolado (Surglutaĵoj)  
**Julius Reinmann & Co.**  
Germanio. Freiburg i. Br. Germanio.  
Lignaĵoj.  
Eksporto al ĉiuj landoj.  
Reprezentantoj serĉataj.

